

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner-Esperantisten im Bundesbahn-Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 3

julio/aŭgusto 1989



41a IFEF-kongreso en Salou/Hispanio 13a ĝis 19a de majo 1989

554 esperantistaj fervojistoj el 23 landoj sekvis la afablan inviton de la hispanaj gekolegoj partopreni trian fojon en illa sunoriĉa lando. Gastiganta urbo estis de la 13a ĝis la 19a de majo 1989 la ĉemara turisma loko Salou. Germana Esperanta Fervojista Asocio (GEFA) estis reprezentata per multnombra delegitaro. Ankaŭ tiu 41a kongreso de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) estis sukcesplena.

Afabila gesto de la organizantoj estis la disponigo de «Esperanto-trajno» inter Portbou kaj Salou, ankaŭ reen. Pluraj aŭtobusoj transportis la alvenintojn ĝis la kongresejo, la hotelo Negresco, kie la plej multaj loĝis. La saman vesperon oni renkontiĝis en la hotela trinkejo por la kutima interkonatiĝo, kiu bedaŭrinde suferis pro la tro laŭta dancmuziko. Jam la tagon antaŭe okazis la malfermo de ekspozicio pri fervojaj objektoj, ankaŭ el eksterlando, en la «Antikva turo» apud la stacidomo. Sekvis intervjuoj de la kompetentuloj per gazetaro kaj televido.

Solena inaŭguro

Je brila, suna vetero, kiu regis preskaŭ ĉiam dum tiu semajno, la kongresanoj atingis per specialaj aŭtobusoj la elegantan festohalon Galas. LKK-prezidanto Molina bonvenigis la honorgastojn sur la podio kaj la ceterajn ĉeestantojn en la salonego. Nome de la Internacia Federacio de Kulturflagan-taj Fervojistoj (FISAIC) s-ro Steppe (Belgio) kore salutis la kongreson. Li aludis al la muziko kiel internacia komunikilo, kiu tamen ne ebligas libere konversacii. La Danaj Ŝtatfervojoj (DSB) surprizis per esperantlingva letero, per kiu ili gratulis al IFEF

INFORMO

Ĉar la posedanto de la *Bulteno*-presejo mortis, tiu ĉi numero ne povas aperi laŭ kutimaj ritmo kaj amplekso. Kiam estos klare, ĉu eblos daŭrigi la presadon en la ĝisnuna presejo, ni decidus pri la estonta preŝado. GEFA

pro la rezulto de la terminara laboro. Krome la ĝenerala direktoro de DSB laŭde menciis la esperantlingvajn klarigojn en la horaroj de DSB kaj aliaj fervojoj. Kiel kutime salutis la reprezentantoj de la landaj asocioj kaj de aliaj Esperanto-organizaĵoj. Por la Sociala Servo de la Germana Federacia Fervojo (BSW) kaj por GEFA s-ro Graß transdonis korajn salutojn kaj dankis al LKK pro la bona akcepto. La vicon de paroloj finis IFEF-prezidanto Gießner. Li memorigis pri la 80jariĝo de la fervojista Esperanto-movado kaj akcentis la fenomenon, ke la esperantistaj fervojistoj okazigis proprajn kongresojn dum 41 sinsekvaj jaroj. La inaŭguran ceremonion akompanis plaĉaj melodioj de la kordinstrumenta orkestro Xirinola.

Esperanto kaj fervojo

La fervojistoj utiligas jam de jardekoj Esperanton por fervojfakaj celoj. Ili aranĝas fakajn prelegojn dum IFEF- kaj UEA-kongresoj, publikigas fakajn artikolojn en siaj organoj, eldonas dulingvajn vortarojn, tradukas internaciajn konvenciojn, zorgas pri esperantlingvaj tekstoj en la horaroj, disponigas fakdelegitojn en UEA, instalas informojn okaze de UEA-kongresoj ktp. La kronumo de la IFEF-kongreso 1989 estis la eldono de "Suplemento al *Lexique général des termes ferroviaires* (UIC) – **Fervoja Terminaro en Esperanto**. Ĝi konsistas el vortolisto kun fakaj kodnumeroj kaj alfabetaj registro. Tiun verkon kreis en intensiva kunlaboro la membroj de la Terminara Komisiono kun subteno de la Internacia Unio de Fervojoj (UIC) kaj — en la erao de la elektroniko — per proprakoste acetita komputilo kun memkreitaj programoj. Nun la fervojistoj disponas pri unuece tradukitaj terminoj kaj pri la bazo por dulingvaj fervojfakaj vortaroj. Dankon oni ŝuldas al la tre aktivaj germanaj membroj de la komisiono, s-roj Ritterspach kaj Hartig. La fervojfakaj taskoj tamen ne ĉesos. Jam komenciĝis preparlaboroj por fervoja vortaro dulingva Germana-Esperanto kaj daŭras la konstanta kolekto de fervojaj terminoj.

La ĉefa faka prelego okupiĝis detale pri grava projekto de la Hispanaj Fervojoj (RENFE), interligi normalŝpure sian reton kun tiu de la Francaj Fervojoj (SNCF). Tiucele estos konstruataj ekde 1992 tute novaj 1700 km de normalŝpuraj linioj. Pluaj 7 000 km de aliaj linioj estos normalŝpurigataj. La resuman tekston de la prelego vidu aliloke en tiu ĉi *Bulteno*.

Ne malpli interesaj estis la fervojaj aktualaĵoj, kiujn

prezentis delegitoj el 10 landoj. S-ro Ritterspach informis pri "Basplanka varvagono kun 12 radaksoj por surtraka ŝoseo". Aliaj temoj estis: "lokomotivo Sybic BB 26000" (Francio); "Nova fervojlinio al nova flughaveno en Hurum" (Norvegio); "60a Internacia Foiro Poznań '88 – Industrio por PKP" (Pollando); "Elektronika lokrezervado" (Belgio); "Pasaĝervagono por handikapuloj" (Aŭstrio); "Nova trajnradiofonio ĉe la Svisaj Federaciaj Fervojoj" (Svisio); "Unuigitaj konteneraj terminaloj sur la reto de Jugoslaviaj Fervojoj" (Jugoslavio); "Aŭtomata trajnkontrolo" (Danio); "150jariĝo de fervoja trafiko sur la teritorio de Ĉeĥoslovakio" (Ĉeĥoslovakio). Cetera la Terminara kaj Fakprelega Komisionoj decidis plifortigi sian influon al venontaj IFEF-kongresoj por akcenti sufiĉe forte ilian fervojfakan karakteron.

Organizaj aferoj

Sub la lerta gvidado de la IFEF-prezidanto Gießner estraro kaj komitato de IFEF okupiĝis en tri laborokunsidoj pri multnombraj temoj de abunda tagordo. La rezultojn vidu en la *Internacia Fervojisto*. Kelkaj estu menciataj ĉi tie. Post plurjara prilaborado, la nova statuto estas finpretigita kaj ekvalidas. S-ro Rösemann, la germana sekretario de IFEF, demisiis; elektitiĝis por tiu posteno d-ro Bolognesi (Italio). La IFEF-prezidanto kore dankis al sia meritplena kunestrarano. La zorgeme ellaborita raporto de la vicprezidanto Gulyás detale demonstris la agadon de la landaj asocioj. Definitive la norvega landa asocio invitis la 42an IFEF-kongreson, kiu okazos de la 2a ĝis la 8a de junio 1990 en Hamar. Ĝin sekvos postkongreso en Bergen. En 1991 IFEF kongresos en Brno (Ĉeĥoslovakio) kaj en 1992 eble en FR Germanio. La Internacia Fervojista Esperanto-Skismajno (IFES) okazos de la 13a ĝis la 20a de januaro 1990 en Sudtirolo organizota de GEFA. Kiel kutime restis nur kelkaj minutoj por libera diskutado. IFEF antaŭvidu estonte pli longan tempon por la necesaj paroloj.

Varia kultura kaj turisma programo

En urba preĝejo muzikis renoma kvinteto per diversaj blovinstrumentoj. La belsonoj de tiuj instrumentoj kaptis ĉiun, kiu bonvoleme estis preta aŭskulti kompoziciojn de nia tempo. La folkloro vespero disvolviĝis antaŭ la duonronda lumigita hotelo Negresco. Bele kostumita grupo prezentis allogajn dancojn el Katalunio. Bedaŭrinde akompanis la dancojn nur sonbenda muziko. Viglaj Flamenco-

dancoj entuziasmigis kontraŭe la partoprenantojn de la abunda bankedo en la festhalo Galas, kie okazis poste ankaŭ la balo. Granda laŭdo por tiu surprizo. Pro la 80jaraĝo de la esperantista fervojista movado okazis bone sukcesinta improvizita omaĝo. Sukcesplena estis ankaŭ kunsido de RENFE-representantoj el diversaj branĉoj kun la kongresanoj, kiuj starigis mult specajn demandojn. Por la partoprenintoj de la lastjara kongreso estis agrable revidi sin en filmo. Krome oni spektis videofilmon pri la venonta kongresloko.

La ofertitaj ekskursoj renkontis grandan intereson, kvankam ili estis parte akompanataj de kelkaj malgataĵoj. La regiono ĉirkaŭ Salou, Reus kaj Tarragona evidente ŝanĝiĝis pro la kreskanta turismo kaj precipe industrio. Bonŝance konserviĝis la malnova urbokerno de Tarragona kun sia fama gotika katedralo, kies pordoj bedaŭrinde restis fermataj tiun posttagmezan dimanĉon. Ĉeesti en Hispanio signifas ankaŭ viziti vinkelon inkluzive klarigojn pri la transformo de vinberoj en centmilojn da ekspeditaj vinboteloj; ĉiukaze la ofertitaj vinoj bongustis. La tuttaga ekskurso kondukis al la delto de la rivero Ebro, kiu havas akvon dum la tuta jaro. Laŭlonge etendiĝis multaj rizkampoj, je tiu sezono kovritaj per akvo. En granda kooperativo oni demonstris la diversajn etapojn de rizprilaborado ĝis la ekspedita varo. De sur ŝipoj la ekskursantoj observis, je la enfluejo de la delto, akvobirdojn kaj aliajn bestojn en siaj protektataj rezervejoj. Neforgesebla estis la manĝaĵo, kiel entute la "hispana kuirejo" kredeble plaĉis al ĉiuj.

Vizito al fiŝaŭkio ankaŭ ne mankis. Unu fiŝkapti ŝipo post la alia albordiĝis en la marhaveno. Laboristoj etendis la retojn por sekigi ilin, aliaj transportis sur ĉaretoj la predon, jam ordigitan laŭ la diversaj specoj en normigitaj konteneroj, al la aŭkcia halo, kie la vendado rapide efektiviĝis.

Sukcesplena kongreso

Je la fino de la eventoriĉa semajno oni povis resumi, ke ankaŭ tiu kongreso bone sukcesis, en modela etoso, sub brila suno, kun novaj iniciativoj por la fervojfaka laboro. Kontentigis la nombro de la partoprintoj, unuafoje kun gastoj el Sovetunio. La kongreslibro estas bone redaktita. Plaĉis la speciala bildkarto kaj la praktika kongresinsigno. Apenaŭ uzata estis la kantiibro, des pli multe deziritaj la speciala poŝtstampo kaj la tri eldonoj de

kongresa bulteno, tajpitaj cetere de dana kongresano. Sinceran dankon ĉiuj ŝuldis al la ĉiam ĝentilaj kaj laboremaj membroj de la LKK, kiuj modele oficis kaj servis por la bonfarto de la partoprenintoj. La IFEF-flago transiris al la sekva LKK. Do ĝis revido venontjare en Norvegio!

Pri la poŝtkongreso al Majorko sekvas aparta raporto. W.B.

FERVOJA TERMINARO DE IFEF

Nun ĝi estas havebla! – Amplekso 228 paĝoj, 10 205 terminoj! – Ĉio nur en Esperanto. – Prezo 12 DM – por GEFA/IFEF-membroj rabato ek de 2 ekzempleroj. – Mendu ĉe Gernot Ritterspach, Alte Mainzer Str. 151, 6500 Mainz 42 aŭ deŝorpoŝte ĉe BOAR Ritterspach, Pm 1403 Z ZA Mainz.

Frankfurt/Main

Die BSW-Esperantogruppe begrüßt herzlich die neuen mitglieder

Frau Claudia Hamelbeck, 6000 Ffm
und Frau Gisela Daniel
6149 Heppenheim

zu ihrem Entschluß unserer Vereinigung beizutreten. Wir hoffen auf rege Mitarbeit und Teilnahme an vielen Veranstaltungen!

Mitteilung

Anläßlich der 33. GEFA-Jahresversammlung (6. bis 8.10.89) in Verden, wird das Esperanto-Zentrum Paderborn einen Bücherstand aufbauen und Literatur anbieten. Es wird nochmals auf die Tombola in Verden (siehe *Bulteno* 2/89, S.5) hingewiesen und um Sachspenden gebeten.

Planung einer Eisenbahnverbindung mit internationaler Spurweite zwischen Frankreich und Barcelona

Beschluß des Spanischen Ministerrats zur Übernahme der internationalen Spurweite.

Resümee eines zweiteiligen Fachvortrages, dargeboten im Rahmen des 41. IFEF-Kongresses in Salou am 17.05.1989, von Marti Guerrero. — Deutsche Übersetzung: G. Ritterspach, Mainz.

Die vorliegende Studie dient dem Ziel, einen Wunschraum zu erfüllen, nämlich das spanische und das europäische Schienennetz ohne Unterbrechung mit einander zu verbinden.

Die Integration Spaniens in die Europäische Gemeinschaft vergrößert die Notwendigkeit, die Beförderung per Bahn für Personen und Güter durch ganz Europa zu erleichtern, ohne lästiges Umsteigen oder Umladen an der Grenze. Die Möglichkeiten zur Verwirklichung verschiedener theoretisch möglicher Lösungen wurden analysiert und nach der wirtschaftlich und technisch am besten geeigneten Variante gesucht, um Spanien mit dem europäischen Schienennetz zu verbinden.

Die Realisierung dieser Studie entspringt der Notwendigkeit, das spanische Eisenbahnsystem dem anderer EG-Länder anzupassen, mit denen Spanien gesellschaftlich und wirtschaftlich auf gleicher Stufe stehen möchte.

Das Leistungsniveau — national und international — im Personen- und Güterverkehr wird für mittlere und große Entfernungen analysiert. Eine Studie zur eventuellen Beibehaltung der jetzigen Spurweite führte zu negativen Ergebnissen, denn die Technik der Radsätze mit veränderlicher Spurweite läßt sich nicht ohne weiteres auf gewöhnliche Züge übertragen. Deshalb wird empfohlen, nach einer anderen Alternative zu suchen.

Diverse Studien wurden erstellt: Verlegung einer dritten Schiene, Doppelspurgleis mit vier Schienen, Umwandlung der jetzigen RENFE-Spurweite in die internationale Spur-

weite unter Beibehaltung der jetzigen Trasse; und schließlich wurde jene Lösung untersucht, die eine Neubaustrecke für Geschwindigkeiten zwischen 200 und 300 km/h vorsieht.

Auf dieser Grundlage wurden die technischen und wirtschaftlichen Realisierungsmöglichkeiten weiterer Lösungen untersucht, sowie einige wichtige Faktoren, insbesondere die Eignung jeder Variante im Hinblick auf die Reisezeit, die Kapazitätsprobleme, die Schwierigkeiten bei der Verwirklichung jeder einzelnen Variante etc.

Schlußfolgernd hält man den Bau einer neuen Strecke mit internationaler Spurweite zwischen Barcelona und der französischen Grenze — unter Umgehung des Engpasses Portbou/Cerbère — für die beste Lösung, um die Verbindung zum europäischen Eisenbahnnetz zu erreichen, technisch, finanziell, wirtschaftlich und gesellschaftlich.

Am 09.12.1988 hat der Spanische Ministerrat den Bau neuer Eisenbahnstrecken mit internationaler Spurweite in Spanien gutgeheißen. Bereits am 07.10.1988 hatte der stellvertretende Generaldirektor der französischen Eisenbahnen, Michel Walrave, auf dem 2. Europäischen Verkehrswege-Symposium in Barcelona erklärt, daß die französische Regierung die Verlängerung der TGV-Schnellverkehrslinie bis Perpignan voll unterstützt, um diese mit der Strecke Barcelona-Madrid-Sevilla zu verknüpfen.

Der Verwaltungsrat der RENFE erteilte am 23.12.1988 seine Zustimmung für die Bestellung von 24 Schnellverkehrstriebzügen bei der Firma Alstom in Frankreich.

Kosten: 50 000 Mio Pesetas. Ferner stimmte er der Bestellung von 75 Hochleistungs-Universallokomotiven bei der Firma Siemens in der Bundesrepublik Deutschland zu. Kosten: 35 000 Mio Pesetas.

Zur Erleichterung und Beschleunigung des Umpurens werden vorab in einer Vorbereitungsphase die derzeit verwendeten Schwellen im Rahmen der Gleiserhaltung durch neuartige, von RENFE entwickelte Schwellen mit einer doppelten Unterlagsplatte ersetzt. Diese sind sowohl für die jetzige RENFE-Spur von 1668 mm, als auch für die internationale Spurweite von 1435 mm geeignet. Um die Spurweite schnell zu ändern, braucht man nur eine Schiene anzuheben und die Schienenbefestigung zu drehen. Zeitplan der RENFE für künftige Strecken mit internationaler Spurweite:

- bis 1992 Madrid - Brazatortas - Cordoba - Sevilla
- bis 1994 Madrid - Zaragoza - Barcelona - französische Grenze

- danach Madrid- Baskenland - Irun
- Brazatortas - Lisboa (Portugal)
- Barcelona - Valencia - Murcia.

Bona ekzemplo

Kiel ekzemplon por efika varbado, kaj kiel dum kaj post kurso oni povas 'teni' la kursanojn, ni jen publikigas metodon, kiun aplikas Esperanto-grupo en Bologna. Ni citas:

"Ni anigas ĉiujn kursanojn al urba, fervoja, nacia organizaĵoj per kurskotizo, kaj ĵarfine ni abonigas la sukcesintojn al iu internacia Esperanto-revuo. Multaj poste restas ligitaj al nia afero."

Ni rekomendas imiti tion laŭ la cirkonstancoj. GEFA

33. GEFA-Jahresversammlung in Verden Unsere Expedition in den Vogelpark «Walsrode»

Es ist wirklich ein Paradies!

In einer zauberhaft schönen, bunten Parklandschaft erleben Sie die exotische Vogelpracht. Sie gehen durch Großvöliere und sind inmitten der dort lebenden Tiere. In der riesigen Freiflughalle können Sie tropische Vögel aus nächster Nähe bestaunen.

Das Papageienhaus beherbergt die größte Papageiensammlung der Welt und in einer Meeresbrandungsanlage sehen Sie die Vögel der Küstenregionen. Natürlich fehlt auch eine Fasanerie nicht.

Es ist hier nicht möglich, alles zu erwähnen.

Der Vogelpark «Walsrode» ist ein einzigartiger Park. Auf einer Fläche von 22 ha finden Sie Wald und Heide, Bachläufe und kleine Seen. In dieser bemerkenswerten Landschaft sehen Sie die bunte Schar von 5000 Vogelarten aus allen Kontinenten und Klimazonen.

Sogar ein Café ist vorhanden im Vogelpark «Walsrode»...

ein Park wie kein anderer!

Die Busse sind bestellt; fahren Sie mit und erleben Sie einen besonders schönen Nachmittag im Rahmen der 33. GEFA-Jahresversammlung in Verden. Hg

**Ansprache des IFEF-Präsidenten Joachim Gießner
bei der Eröffnung des 41. IFEF-Kongresses in Salou (Auszug)**

Nach herzlichem Dank an die örtlichen Organisatoren führte Herr Gießner folgendes aus:

Die Kette der Jubiläen reißt nicht ab. 80 Jahre Eisenbahner-Esperantobewegung können wir in diesem Jahre feiern. Hier im Kongreß planen wir eine Feierstunde. In diesen 80 Jahren hat es unser Verband geschafft, in mehr als der Hälfte dieser Zeit ununterbrochen alljährlich seine internationalen Kongresse abzuhalten. Dieses Phänomen wurde möglich, weil in Europa seit 1945 kein Krieg war und dank der Aufopferung hunderter von Kollegen.

Der ständig wechselnde Zustand unserer Welt in diesen 80 Jahren mit seinen zwei Weltkriegen und tiefgreifenden Veränderungen auf der Landkarte, mit seinen vielfältigen Ideologien und Regierungssystemen zwang die Menschen in allen Kontinenten, sich den dauernd neuen Lebensbedingungen anzupassen. Aber vor allem die letzten 40 Jahre, also seit IFEF besteht, überschwemmten die Welt mit so vielen grundlegenden Veränderungen, Erfindungen, Katastrophen, daß wir heute erkennen müssen, daß wir alle, also auch wir Esperantisten, unter völlig anderen Bedingungen leben als damals, als nach dem Kriege die Menschen begannen, ihr Leben wieder aufzubauen. Wir können nicht übersehen, wie erschreckend unterschiedlich die Lebensumstände zwischen den Regionen der Erde sind, besonders zwischen Nord und Süd. Das kann nicht ohne Einfluß auf die Esperanto-Bewegung bleiben, die ja international ist.

Wir Eisenbahner, die wir Teil dieser allgemeinen Esperanto-Bewegung sind, leben hauptsächlich in Europa. Aber schon in diesem kleinen Kontinent sind die Lebensbedingungen von Land zu Land sehr unterschiedlich. Das heißt für uns, daß auch wir unsere Handlungsweise der Situation anpassen müssen. In diesem Zusammenhang verweise ich auf einen Artikel im UEA-Organ

«esperanto» vom Februar mit der Überschrift *“La oni-diroj de Ahrenshoop”*. Dieser Titel charakterisiert eine der größten Sünden der Esperantisten: Wie oft hören wir, daß es in Arbeitspapieren, Berichten, Protokollen, Empfehlungen heißt: ‘man’ muß das und das tun, aber niemand erfährt, wer ‘man’ ist. Folglich sind diese Berschlüsse nicht das Papier wert, auf dem sie geschrieben sind. Das bedeutet auch, daß z.B. der IFEF-Vorstand, das Komitee und überhaupt jede Gruppe immer bedenken müssen, ob Ideen und Beschlüsse machbar sind und wer sie ausführt.

Wir Eisenbahner hängen aber auch weitgehend von der Entwicklung in unserem Beruf ab. Wir wissen alle, wie stark diese Entwicklung unser persönliches und unser Familienleben beeinflusst. Die neuen Organisationsformen und Rationalisierungstendenzen greifen tief in das Leben jedes Eisenbahners ein. Das aber kompliziert auch mehr und mehr jede kulturelle Tätigkeit, also auch die für Esperanto.

Insgesamt sind die Kräfte der Esperantisten begrenzt. Uns fehlen zwei wesentliche Faktoren des heutigen Lebensstils: nämlich Geld, der Schlüssel für alles, und der Druck der Massen. Andererseits verfügen wir über Eigenschaften, die nicht überall vorhanden sind, nämlich Überzeugung, Widerstandskraft und das Wissen, daß wir uns einer moralisch hervorragenden Aufgabe verschrieben haben, die niemandem etwas nimmt, aber allen Menschen ein friedliches, gemeinsames Verständigungsmittel in die Hand geben will. Noch weiß niemand, ob der fundamentale Umbruch, der gegenwärtig die ganze Welt erfaßt, für unsere Sprache günstig oder ungünstig sein wird. Aber Esperanto hat sich stets positiv entwickelt, wenn Frieden herrschte statt Gewalt. Trotzdem sollte man nicht die Augen verschließen vor der Tatsache, daß die Ausgaben für Waffen noch immer wachsen. Wir sollten nicht übersehen,

daß 1988 auf Erden 36 Kriege ausgetragen wurden. Und was wohl noch gefährlicher ist, daß die Waffen für diese Kriege von Staaten der ganzen Welt geliefert wurden, zuweilen sogar vom selben Staat an beide kriegführenden Seiten.

In diesem Zusammenhang muß man auch die großen 'friedlichen' Katastrophen sehen. Ich nenne nur drei von vielen: 1976 entwichen in Seveso zwei Kilogramm einer der giftigsten Chemikalien der Welt. Wer spricht heute noch davon? 1986 schmolz der Reaktor in Tschernobyl. Hat sich viel geändert? Vor kurzem die Schiffskatastrophe vor Alaska. Experten sagen, noch 10 solche Katastrophen und die Erde stirbt. Warum ich das erwähne? Weil man aus Fehlern lernen muß. Und wir alle haben die Möglichkeit, uns so zu verhalten, daß die Verantwortlichen handeln müssen, um Katastrophen zu verhindern.

Zurück zu unserem eigenen Gebiet. Wir Eisenbahner-Esperantisten brauchen uns zum Zeitpunkt unseres 80. Geburtstags nicht zu schämen. Im Gegenteil. Wir haben trotz unserer bescheidenen Kräfte ein Ziel in Form unseres Fachwörterbuches erreicht, von dem frühere Generationen nur träumen konnten. Keine andere Esperanto-Organisation kann ein derart repräsentatives Zeugnis einer großartig geführten und bewältigten Aufgabe auf internationalem Niveau vorweisen. Ich möchte hier, vor dem gesamten Kongreß und namens der Föderation, meinen tief empfundenen Dank aussprechen an die beiden 'Eckpfeiler' dieses gigantischen "Unternehmens Terminaro", an die Kollegen Ritterspach und Hartig, und an ihre unermüdeten Mitarbeiter überall in den Landesverbänden, an die, die hier im Saal sind, an die, die nicht kommen konnten und alle, die uns schon verlassen mußten.

Solche Kräfte, wie sie diesen Erfolg ermöglicht haben, mögen auch uns leiten, wenn IFEF nun in das 9. Jahrzehnt geht. Beweglich wollen wir sein, niemals die Hoffnung aufgeben. Hartnäckig den Weg gehen, den wir als richtig erkannt haben. Nie wollen wir die Geduld verlieren. Dann werden wir unser Ziel erreichen.

NEKROLOGOJ

La 27an de marto forlasis nin

Karl Koenemann (86)

el Kolonjo. Li estis fidela membro ekde 1929 kaj kunfondinto de la GEFA-grupo en la BSW de la distrikto Kolonjo. Ni profunde bedaŭras lian forpason kaj kondolencas sincere al liaj familianoj.

Kondolencadreso: Sinjorino Else Koeneemann, Gottesweg 3, 5000 Köln 51.

La 14an de marto mortis en Mannheim

Arthur Benders (90)

Li lernis la internacian lingvon jam en 1926. Ĝis 1987 li partoprenis regule la lokajn kaj regionajn renkontiĝojn. Ekde la novfondiĝoj de IFEF/GEFA kaj Germana Esperanto-Asocio post la dua mondmilito li membriĝis. Li daŭre kaj efike varbis por Esperanto kaj aranĝis i.a. ekspozicion "*Kontakte mit 80 Ländern in einer Sprache*". Li verkis kaj tradukis multajn versaĵojn. Partoprenis la funebran ceremonion i.a. niaj kolegoj Karl Bernhard, Hans Riehn kaj sinjoro Helmut Rößler. Ni bedaŭras lian forpason kaj kondolencas denove sincere al liaj familianoj. Ni perdis aktivulon kaj veran amikon.

La 25an de majo mortis en Kassel

Konrad Tasler (64)

neatendite, tuj post reveno de la IFEF-kongreso en Salou, kiun li devis pli frue forlasi. Li eklernis Esperanton en 1952, precipe por faciligi sian hobion, la kolektadon de poŝtmarkoj. En 1960 li fariĝis kasisto de la fervoĵista grupo Kassel kaj plenumis la taskojn de distriktkomisiito por la direkcio Kassel de 1966 ĝis la jarmfino 1974. GEFA perdis fidelan aktivan membron kaj sincere kondolencas al liaj edzino kaj familianoj.

Majorko – perlo de Mediteraneo

Kvindeko da IFEF-kongresanoj el 15 landoj akceptis la oferton pasigi de la 20a ĝis la 24a de majo 1989 feriajn tagojn sur la Baleara insulo Majorko. Sabaton matene la aŭtobuso kun siaj gastoj atingis la flughavenon de Barcelona. La grupo troviĝis baldaŭ en moderna aviadilo super la maro kaj atingis post duona horo la flughavenon de Palma. Enloĝigo en hotelo rekte ĉe maro, kies ondoj senĉese kaj brue ĵetis akvoamasojn sur la strandon. Kelkiu kuraĝis naĝi en la tre varma akvo.

La urbo Palma pligrandiĝas konstante. Kiel en Salou ĉie kreskas novaj hoteloj aŭ oni ŝanĝkonstruas. Tamen en la urbokerno oni klopodas konservi la historiajn palacojn. Majeste elstaris la katedralo, juvelo de hispana gotiko, vespere lumigata. En la grandskala haveno abundis jaĥtoj kaj motorboatoj. Dumtage estis videblaj la blankaj pramŝipoj, kiuj interligas la insulon kun la cetera mondo.

La unua aŭtobusekskurso kondukis al la nordo de la insulo. Preterpasis ruĝterenaj kampoj kun multnombraj fruktoarboj kaj olivotrunkoj. Tagmanĝo en rustika restoracio, en pajlokovrita pavilono. La du/trietaĝaj hoteloj en la apudaj lokoj faris preskaŭ intiman impreson kompare kun la "amasloĝejoj" en Palma. Pluen per ŝipo ĝis la plej norda punkto kaj per aŭtobuso sur dekliva strato ĝis preskaŭ la pinto de la montaro. De sur la t.n. balkono la ekskursantoj elrigardis sur la belegan pejzaĝon, krudajn montojn kaj bluan maron. Ankaŭ la oriento de la insulo estis vizitata. Antaŭ la Drako-kaverno kolektiĝis amaso da vizitantoj, kiuj poste admiris la efektoplene lumigitajn stalagmitojn kaj stalaktitojn. Je la fino, en giganta halo, ĉiuj ĝius koncerton de muzikistoj, kiuj sur lago veturis en lumigitaj boatoj. Alia celo estis la grandskale konstruita monaĥejo de kartuzianoj, nun privata posedaĵo. La pola komponisto Chopin loĝis tie kun sia franca amatino dum du jaroj, ne estimita de la loĝantaro.

La turisma programo finiĝis por la postkongresanoj kaj centoj da aliaj spektantoj per grandioza spektaklo en tiucvele konstruita halo. Historie vestita reĝoparo bonvenigis ĉiun unuopan vizitanton. Kavaliroj demonstris turnirbatalojn sur galopantaj ĉevaloj. Samtempe la spektantoj konforme al la historia epoko devis konsumi sian varman manĝon sen manĝilaro, sed kun tro laŭta muziko.

Post la reflugo al Barcelona la tieaj esperantistoj atendis la grupon en eleganta restoracio por la lasta komuna tagmanĝo, antaŭ ol komenciĝis la revojaĝo per trajno. La tagoj sur la insulo Majorko restos neforgeseblaj. Tion asertis la partoprenintoj kaj dankis sincere al ges-roj Samsó kaj Devis pro iliaj modela organizado kaj konstanta prizorgado.

W.B.

Seniorentreffen

Am 9. September 1989 treffen wir uns zum diesjährigen Seniorentag in **Frankfurt/Main**. — Tagungsort: Hauptbahnhofsgaststätte – Frankfurter Saal – im ersten Stock (gegenüber Gleis 4/5). — Treffpunkt 10 Uhr. — Alle Ruheständler, die Mitglied im BSW sind, werden hiermit herzlich eingeladen. — Bitte melden Sie sich bis spätestens 30. August bei mir an:

*Elfriede Kruse
Wiener Straße 121
6000 Frankfurt/Main 70*

oder per EDS an:

*Bahnhof 605
Offenbach/M.*

Redaktfino por n-ro 4/89 estas la 15.9.1989

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). — Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 8620 Lichtenfels, Sachsenstr. 7 – Druck / preso: G.C. Antverpeno.